

Kongresa libro



7-a Afrika Kongreso de
Esperanto

Tiun ĉi kajeron posedas (via nomo):
.....
.....
.....

Kongresa libro

7-A AFRIKA KONGRESO DE
ESPERANTO

Afrika Komisiono de UEA
2019

Kongresa Libro de la 7-a Afrika Kongreso de Esperanto

© Afrika Komisiono de UEA, 2019
www.afriko-esperanto.org

Kovrilo, redaktado, enpaĝigo: Adjévi Adjé

Presita en Buĵumburo, Burundo, ĉe la kongresejo.

Eldonkvanto: 200 ekzempleroj

Enhavo

Paĝo 7	Enkonduko
Paĝo 8	Burundo, la lando de la 7-a AKE
Paĝo 9	Membroj de la Afrika Komisiono de UEA
Paĝo 10	Membroj de ANEB kaj de la Loka Kongresa Komitato
Paĝo 11	Bonvenon al Buĵumburo
Paĝo 12	Salutparolado de la prezidanto de UEA
Paĝo 13	Salutmesaĝo de la kunordiganto de la Afrika Komisiono de UEA
Paĝo 14	Salutparolado de la prezidanto de ILEI
Paĝo 15	Salutmesaĝo de Renato Corsetti el Britio
Paĝo 16	Bonveniga parolado de la prezidanto de ANEB
Paĝo 17	Salutvortoj de la ĉeforganizanto
Paĝo 18	Salutmesaĝo de Ans Bakker-ten Hagen el Nederlando
Paĝo 19	Salutmesaĝo de prof. d-ro SO Jinsu el Koreio
Paĝo 20	Malfermaj vortoj de la loka aŭtoritato
Paĝo 21	Salutmesaĝo Humphrey Tonkin el Usono
Paĝo 22	Salutmesaĝo de Stefan MacGill el Nov-Zelando
Paĝo 23	Salutmesaĝo de Probal Dasgupta el Barato
Paĝoj 24 kaj 25	Kongresaj aktivaĵoj
Paĝo 26	Necesaj informoj
Paĝo 27	Simboloj de Burundo
Paĝo 28	Vortareto Esperanto/ Kirundi kaj Svahila
Paĝo 29 ĝis 33	Prelegoproponoj kun koncizaj vivresumoj de la prelegantoj
Paĝoj 34 kaj 35	Priskriboj pri la ekskursejoj
Paĝo 36	Kongresa regularo
Paĝo 37	Kroniko pri la Afrikaj Kongresoj de Esperanto
Paĝo 38 ĝis 41	Nomlisto de la aliĝintoj
Paĝo 42	La Espero, Esperanta himno
Paĝo 43	Por personaj notoj

Enkonduko

Dank' al iniciato kaj aktiva kunlaboro inter la Afrika Komisiono de UEA, Asocio de Beninaj Esperantistoj (ABeE) kaj la Ne Registara Organizo Scio Sen Barilo (SSB), la tradicio pri la Afrika Kongreso de Esperanto (AKE) restariĝis, post 17-jara paŭzo, fine de la jaro 2013 kaj komence de la jaro 2014. Ekde tiam la AKE okazas ĉiun trian jaron, ĉar la afrikaj esperantistoj konsciiĝis pri la pozitiva influo, kiun havas la tutkontinenta kongreso en la disvastigado de Esperanto kaj en la bonfarto de la movado en la kontinento.

Io rimarkinda kadre de la ĉi-jara kontinenta kongreso, la sepa eldono, estas la forta aliĝo de afrikanoj. Tio evidente aŭguras bonan estontecon por Esperanto en la lulilo de la homaro. Samtempe eblas ankaŭ kun feliĉo konstati, ke la krokodiloj (gekomencantoj) dum la antaŭaj kongresoj pli kaj pli fariĝis fluaj parolantoj de Esperanto kaj eĉ kelkaj el ili estraraniĝis en TEJO!

Tiu ĉi kongresa libro, kiun mi plezure redaktis, celas doni superrigardon pri bazaj informoj rilate la kongresajn landon kaj programon: prezento de Burundo, kelkaj ĝiaj kulturaj aspektoj, utilaj esprimoj en la lokaj lingvoj (Kirundi kaj Svahila), dumkongresaj ekskursoj, kronologia tabelo de la kongresaj aktivaĵoj, subtemoj kaj prelegontoj, nomlisto de la aliĝintoj sen forgesi la salutmesaĝojn adresitajn al la kongreso... Mallonge, per tiu ĉi libro, mi prezentas al vi gravajn sciigojn por helpi vin organiziĝi kaj eventuale bone elturniĝi surloke antaŭ, dum kaj post la kongreso laŭbezzone.

Mi multe dankas al s-ro John Magessa, kiu volonte akceptis traduki la esprimojn al la svahila, al Jérémie Sabiyumva pri la Kirunda versio kaj al ĉiuj, kiuj iel helpis en la pretigado de tiu ĉi libro.


Mi mem antaŭĝojas malkovri Burundon, revidi kelkajn miajn amikojn kaj konatiĝi kun multaj novaj dum tiu ĉi kongreso. Certe kune kun vi ĉiuj la 7-a Afrika Kongreso de Esperanto nur estos pli ĝua, mirinda, plaĉe kaj plezurige neforgesebla en la lando de Amahoro, kio signifas "Paco estu kun vi!"

Adjévi Adjé, **Togolando**

Respondecoj en la Afrika Komisiono de UEA:

Kulturo kaj Bulteno.

Burundo, la lando de la 7-a AKE



Burundo antaŭe Burundio, (Kirundie Republika y'u Burundi, france République du Burundi) estas malgranda lando en la oriento de Centra Afriko en la regiono de la Grandaj Lagoj. Ĝi estas dividita en dek ok provincoj, ĉiu nomita laŭ sia ĉefurbo. Ĝi limas norde Ruandon, okcidente - Demokratian Respublikon Kongo, oriento kaj sud-oriento - Tanzanion. Aliro al maro mankas. Sud-okcidente ĝi limas la lagon Tanganjiko.

La areo estas nur sub 28000 km² kun proksimuma loĝantaro de preskaŭ 13000000. La ĉefurbo estas Bujumburo. Kvankam la lando estas en la mezo de la kontinento, granda parto de la sudokcidenta landlimo apudas la lagon Tanganjiko.

La loĝantaro konsistas ĉefe el la *tucioj* kaj *hutuoj* kaj *tvaŭoj*. Ili okupis Burundon ekde la formiĝo de la lando antaŭ 5 jarcentoj. Burundo estis regata kiel reĝlando de la tucioj dum pli ol ducent jaroj. Tamen, ĉe la komenco de la 20-a jarcento, Germanio kaj Belgio okupis la regionon, do Burundo kaj Ruando fariĝis eŭropa kolonio konata kiel Ruanda-Urundi. Politika agitado okazinta en la regiono pro sociaj diferencoj inter la tucioj kaj hutuoj, provokis civilan militon en Burundo meze de la 20-a jarcento. Nuntempe Burundo estas regata kiel prezidenta reprezenta demokrata respubliko. 62 % de la burundanoj estas katolikoj, 8 % ĝis 10 % estas islamanoj kaj la ceteraj sekvas indiĝenajn kredojn kaj aliajn kristanajn konfesiojn.

Burundo estas dense loĝata, kun granda elmigrado. Kobalto kaj kupro estas inter la naturaj rimedoj de la lando. La ĉefaj eksportaĵoj inkluzivas kafon, teon kaj sukron.

Membroj de la Afrika Komisiono de UEA



François Hounsounou,
Kunordiganto:
Rilatoj kun afrikaj landaj asocioj,
Benino.



Gilbert Niyukuri,
Vickunordiganto:
Turismo, AKE, Sporto,
Burundo.



Joel Muhire Ndaziboneye,
Sekretario:
Junulara Agado, Protokolado,
DR Kongo



Cedrick Irakoze,
Informado, reklamado en sociaj retejoj,
Kenjo.



Adjévi Adjé,
Afrika bulteno, Kulturo,
Togolando.



Miora Raveloharison,
Virina Agado,
Madagaskaro.



Viktor Ntonto,
Instruado, revigligo de lokaj E-klubo,
Kameruno.



Moses Gbetogo Opa,
Rilatoj kun publikaj instancoj,
Niĝerio.

Membroj de ANEB kaj de la Loka Kongresa Komitato



Ĉeforganizanto:
Jérémie SABYUMVA



Prezidanto de ANEB:
Aimé-Patrick MANIRAKAZI



Hasano NTAHONSIGAYE



Twalibu
BIKIRANTANGANWA



Ada Florence
IRACADUKUNDA



Gilbert NYUKURI



Jean Claude BAZUMBAZE



Cedrik IRAKOZE




Gilbert NDIHOKUBWAYO

Bonvenon al Buĵumburo...

Buĵumburo estas la ĉefurbo de Burundo kun ĉirkaŭ 1 300 000 da loĝantoj en la jaro 2018. La urbo situas ĉe la Tanganjika-lago kaj estas la plej granda urbo de Burundo, registara kaj ekonomia centro. La urba teritorio konsistigas la provincon Bujumbura Mairie, unu el la 18 administraj provincoj de la lando, kaj krom de la lago Tanganjiko ĉirkaŭatas nur de la apudurba provinco Bujumbura Rural.

En la urbo estas produktataj i.a. cemento, teksaĵoj kaj sapo. Buĵumburo estas ankaŭ la plej granda interna haveno, grava enŝipigejo de la eksportvara plimulto (kafo, kotono, feloj kaj stano) ĉe la Tanganjika-lago.

Buĵumburo evoluis el vilaĝeto, kiu estis ekde 1889 milita posteno de la iama Germana Orient-Afriko. Post la dua mondmilito ĝi iĝis administra centro de belgia popolunia mandato pri Ruanda-Urundi. La urbo estis alinomita de Usumbura al Buĵumbura, kiam Burundo en 1962 sendependiĝis. Ekde la sendependiĝo Buĵumburo estis loko de multaj intertnaj bataloj, kiam la *hutuoj* batalis kontraŭ la *tuci*-dominata armeo de Burundo.



de prof. d-ro Duncan Charters, **Usono**
Prezidanto de UEA



Karaj kongresanoj,

Estas por mi granda ĝojo kiel la nuna prezidanto de Universala Esperanto-Asocio saluti la 7-an Afrikan Kongreson de Esperanto en Buĵumburo, Burundo. Kiom ni kune progresis post la 6-a Afrika Kongreso antaŭ nur tri jaroj! Tiu ritmo de tutafrikaj kongresoj montriĝis saĝa decido. Ĝi donis al vi la eblecon kaj tempon prepariĝi por vere signifoplenaj antaŭensaltoj en diskutoj kaj agado, pere de konatiĝo kun kunlaborantoj el ĉiam pli da nacioj kaj diverseco de situacioj. Via kongreso kapabligos la treege kreskintan partoprenantaron koncepti la defion de via kongresa temo, "Verdigo de la kontinento Afriko". Tiu temo ne estas ia vizia revo de naivuloj. La logiko de Esperanto kiel instrumento por tutmonda komunikado, kaj aparte por la bezonoj de Afrikanoj, estas argumentebla eĉ pli konvinka hodiaŭ ol en la tempo de D-ro Zamenhof. Vera tutmondiĝo neeviteble konsciigas la neceson de egala pezo kaj respekto al la kontribuoj de ĉiuj kontinentoj, kaj reliefigas la nejustecon de la tradicia gvidado de Eŭropdevenaj popoloj, kun altrudo de iliaj kulturoj kaj lingvoj al la cetera mondo kvazaŭ ili estus nature superaj.

La maturiĝo de Afriko en nia hodiaŭa mondo devas speguliĝi ankaŭ en la pli vasta kaj pli memfida sendependiĝo de lingvoj kaj kulturoj neindiĝenaj al afrikaj popoloj. En via kongreslando, same kiel en aliaj afrikaj landoj, burundanoj ĉiam pli konscias pri la valoro de la propra lingvo, kun ĝia kulturo kaj tradicioj. Tio ebligas veran demokration inter la civitanoj de la lando, ĉar per natura uzo de la burunda lingvo por ĉiutagaj oficialaj kaj neoficialaj rilatoj, tio forigas la dividon inter parolantoj de okcidentaj lingvoj kaj aliaj kiuj ne havis la tempon aŭ okazon spertiĝi pri ili. Tio ne signifas ke oni ne lernu aliajn lingvojn por komunikiĝi kun la ekstera mondo, sed gravas ke tio estu elekto kaj ne devigo. Kaj tie kuŝas la ĝis nun tro sekreta avantaĝo de Esperanto. Ni uzas tiun komunikilon ĉar ĝi estas nia memelektita lingvo, la lingvo de nia popolo, ne tiu de fremduloj kun kiuj ni neniam povos identiĝi je sama komunika nivelo de respekto, justeco kaj egaleco.

La Afrika movado multe profitis de la laboro de pioniroj kiel Tibor Sekelj, iniciatinto de la *Karavano de amikeco*, kaj Hans Bakker, kiu trovis la rimedojn kontaktigi afrikanojn kun esperantistoj sufiĉe klarvidaj por subteni la evoluon de la movado finance, per donacado de materialoj, kaj per instruado en klasoj kaj individue. Tamen same kiel en la politika evoluo, venis la momento por sendependiĝo en la Esperanta mondo. Kiel saĝe diris unu el viaj multjaraj subtenantoj, eksprezidanto de UEA Renato Corsetti, Esperanto progresos en Afriko nur se la movadon gvidos afrikanoj. La elekto de la nova Afrika Komisiono rekomendata al la Estraro de UEA post konsultiĝo inter afrikanoj, kun intenca rezulta enplekto kiel komisionanoj kaj kunlaborantoj de diverspensaj aktivuloj maksimume reprezentaj, signalas tiun novan stadion. Ne mankos defioj por la kunlaborado, sed tiujn venkos ĉies agnosko de la bona motivado de dediĉita kolegaro kaj sincera amo kaj humila respekto al ĉiuj. Ni havas helajn esperojn pro la kvalito de viaj laborantoj, kun kiuj vi konatiĝos dumkongrese. Kiel ekzemploj elstaris en sia daŭra kunlaborado kun UEA du individuoj: la kunordiginto de la 6-a Afrika Kongreso, Adjé Adjévi, kaj la kunordiganto de la nuna kongreso, burundano Jérémie Sabiyumva, tre efika kaj ŝatata membro de la Estraro de UEA elektita pro liaj elprovitaj kvalitoj kaj pro la bezono rekte prizorgi afrikajn interesojn. Nun defio por vi: ĉu vi pretas por organizi Universalan Kongreson en Afriko en 2023? Se jes, kaj tion proponi estos ja via decido, la Estraro de UEA ankaŭ staras preta por helpi al vi realigi tiun aspiron. Kunlaboru kun UEA per via aliĝo, per viaj ideoj, via kreemo, via bezonata perspektivo, kaj la verdiĝo de Afriko ĉiam pli senteblos!

Mi fine aliĝas al la sento de la kunordiganto de la Afrika Komisiono de UEA, François Hounsounou, dezirante al ĉiu kongresano feliĉan kristnaskon kaj novjaron 2020.

Ĝuu la mirindan efikon de interparolado, interagado, kaj novaj amikiĝoj per tutsemajna uzado de nia lingvo: vi trovos tion vivŝanĝa sperto!

de François Hounsounou, **Benino**
Kunordiganto de la Afrika Komisiono de UEA



Honoraj invititoj,
Karaj gesamideanoj,
Karaj geamikoj,
Karaj gefratoj,

Estas granda ĝojo kaj honoro por mi bonvenigi vin al la 7-a Afrika Kongreso de Esperanto de UEA en Buĵumburo, urbo de gastamo.

Partopreno en Universalaj Kongresoj estas malfacila por afrikanoj pro diversaj kialoj, kiujn ni ĉiuj scias. Tial la Afrika Kongreso de Esperanto konsistigas bonan alternativon por afrikanoj renkontiĝi, babiladi, interkonatiĝi, diskuti pri Esperanto kaj spertiĝi movade. Ĝi kontribuu al la utilo de Esperanto kaj al la bonfarto de la enkontinenta movado.

Mi trovas tre speciala tiun ĉi okazantan kongreson pro la granda nombro da aliĝintoj kaj partoprenantoj. Estas salutinde. La LKK, sub la bona gvidado de Jérémie Sabiyumva, preparis memorindan semajnon por vi kun interesaj prelegoj, kulturaj aktivajoj, ekskursoj kaj distraĵoj. Bonvolu plene ĝui ilin.

La elektita kongresa temo "Verdigo de la kontinento Afriko" estas unu el la nuntempaj zorgoj de la Afrika Komisiono.

Kaj fine, nome de la Afrika Komisiono de UEA, mi salutas vin ĉiujn kaj deziras plenan sukceson al la kongreso. Al la partoprenantaj membroj de la Afrika Komisiono, LKK-anoj kaj funkciuloj de ANEB mi aparte dankas pro ilia diversa subteno kaj helpo.

Mi kaptas la okazon por deziri al vi ĉiuj feliĉajn kristnaskon kaj novjaron 2020.

Vivu Universala Esperanto-Asocio
Vivu la Afrika Komisiono de UEA
Vivu Burunda Nacia Esperanto-Asocio.

François Hounsounou,
Kunordiganto de la Afrika Komisiono de UEA

de Mireille Grosjean, **Svislando**
Prezidanto de ILEI



Karaj gekongresanoj!

Mi estas tre tre ĝoja esti inter vi en Bujumbura. Denove mi estas en Afriko, denove mi estas en Burundo, denove mi vidas viajn gvidantojn, kiujn mi ekkonis en 2011, kiam mi instruis ĉi tie. Plie mi estas tre tre ĝoja ekkoni plurajn esperantistojn, kun kiuj mi rilatis jam delonge per retmesaĝoj, kaj kiujn mi hodiaŭ vidas antaŭ mi kaj povas aŭdi kaj aŭskulti.

La kongresa semajno estos plenplena. La programo buntas, la aktivajoj abundas, la taskoj ne mankas. Kiam mi flugas al Afriko, homoj en mia lando diras al mi: *Havu agrablajn feriojn!* Tamen tiaj kongresaj semajnoj ne estas ferioj, sed frenezaj labortagoj. En mia taskaro estas la Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA, ekzamensesio pri lingvokapablo, dua nivelo. Horojn la kandidatoj sidos kaj skribos, horojn la Loka Ekzamena Komisiono korektos kaj kalkulos poentojn. Aktivula Maturigo, AMO, lertiga seminario, estos okazo progresi en la rilataj kapabloj por adekvate paroli al ĵurnalistoj, lernejdirektoroj, ministroj kaj similaj moŝtuloj, kaj verki trafajn gazetarajn komunikojn atentokaptajn. Esperanto-Instruista Trejnado EIT donos dum la kongresa semajno okazon por la kandidatoj instrui al komencantoj kaj progresantoj, do provlecionoj okazos. Post la Kongreso mi restos en Bujumbura por esti kun ili kaj kontroli ilian laboron dum pli ol jaro da perreta studado. Se ĉio iros glate, vi havos en Burundo la unuajn diplomitajn instruistojn en la tuta Afriko.

Mi iom timas pri tiu ĉi kongreso, ĉar mi scias, ke vi venas kun grandaj esperoj. ILEI devas fari tion, ILEI devas solvi tion, ILEI devas produkti tion, ILEI devas.... Tamen la rimedoj de ILEI estas malgrandaj kaj ankaŭ la homfortoj estas modestaj. Ĉiuj estas volontuloj, ILEI ne havas Centran Oficejon. Niaj estraranoj havas profesion kaj laboras. Mi mem estas emerito, konsekvence mi povas labori por la Movado preskaŭ dum la tuta tago. Tamen miaj tagoj havas nur 24 horojn, kaj mi devas kuiri kaj purigi mian loĝejon, lavi vestaĵojn kaj gladi, kiel ĉiuj faras en mia lando. Kaj de tempo al tempo mi devas iom dormi... Ni devas ĉi tie kune sidi kaj kunsidi, mi volas aŭdi vin, viajn esperojn, viajn sugestojn, viajn proponojn. Kaj kune ni devas trovi solvojn. Helpu! Mi ne dubas, ke tiu ĉi kongreso estos fruktodona.

Mireille Grosjean

Devenas el franclingva Svislando.
Estis profesia fremdlingvoinstruisto.
Estas prezidanto de ILEI ekde 2013.
Jam vivis pli ol jaron en Afriko.
«Senrita emerito, senbrutara nomado, babilema poligloto».

de Renato Corsetti, **Britio**



Karaj afrikaj esperantistoj, estimataj gastoj,

Mi estas sufiĉe maljuna, kaj mi memoras pri la unuaj paŝoj de Esperanto en Afriko, vere ne pri la tutunuaj, kiuj okazis dum la unua duono de la pasinta jarcento fare de eŭropanoj, kiuj estis en Afriko kiel funkciuloj de la tiamaj eŭropaj regnoj en la afrikaj kolonioj. Sed mi estis tie, kiam TEJO en la 70-aj jaroj de la pasinta jarcento decidis, ke ekstereŭropigo estas tasko de TEJO, kaj mi estis tie kiam Hans Bakker komencis instrui per leteroj al kelkaj afrikanoj en la franca lingvo, dum helpis lin Germain Pirlot, kaj mi estis en homplena ĉambro en la Universla Kongreso en Stokholmo en 1980, kiam Hans Bakker fariĝis komisiito pri Afriko de UEA. Multo okazis post tiu momento kaj dum jaroj pakaĵoj kun lerno-libroj vojaĝis de Eŭropo al Afriko. La kampanjo sukcesis. Unue estis individuaj esperantistoj kaj poste lokaj grupoj kaj poste landaj asocioj. Kelkaj Esperanto-instruistoj vojaĝis el Eŭropo al Afriko, kelkaj afrikanoj sukcesis veni el Afriko al kongresoj en Eŭropo kaj jen ni estas en la nuna situacio. Nun la movado por Esperanto ekzistas en granda parto de Afriko, kvankam en neniuj landoj ĝi estas tre forta, sed kongresoj kiel ĉi tiu pravas, ke Esperanto en Afriko estas realaĵo.

Antikvaj eŭropaj filozofiistoj kutimis diri “*Natura non facit saltum*”, alivorte “naturo evoluas regule sen abruptaj saltoj”.

Fakte Esperanto evoluis regule en Afriko, sed nun venis la momento por salti antaŭen kaj meti la afrikan movadon je alia nivelo. Nun post la forpaso de Hans Bakker kaj aliaj fruaj pioniroj, la afrika movado devas komenci zorgi pri si mem per siaj propraj fortoj.

La Afrika Komisiono devas komenci zorgi pri disvastigo de Esperanto al tiuj regionoj de Afriko, en kiuj ĝi ne ekzistas. Mi pensas ekzemple pri Etiopujo kaj Somalujo.

Afrikaj grupoj kaj landaj asocioj devas komenci financi sin per la kotizoj pagataj de la membroj. Cetere nun eĉ la kotizoj de UEA baziĝas sur la nacia produkto, kaj do, en Afriko ili estas tre malaltaj, sed, tamen, oni devas kolekti ilin kaj poste transdoni ilin al UEA aŭ administri tiujn, kiuj apartenas al la landa asocio.

La lokaj grupoj devas vivi per la kotizoj kaj donacoj de la membroj. Tion oni jam faras en la tuta mondo kaj nun venis la momento, por ke ankaŭ Afriko sekvu la tutmondan vojon.

Cetere la poŝtaj kostoj iĝis tiom altaj, ke la tempo, kiam oni produktis librojn en Eŭropo kaj poste sendis ilin en pakaĵoj al Afriko, pasis. Nun ankaŭ pri tio oni devas zorgi ĉi tie.

Mi estas certa, ke la afrika movado jam atingis la ĝustan nivelon por fari tion. Mi certas, ke ĝi volos fari tion kaj per tio vere sendependiĝi. Certe restas malfacilaj viv-kondiĉoj en pluraj teritorioj kaj vivo-kampoj, sed mia sento estas, ke Afriko jam estas en kondiĉo fariĝi normala rilate al Esperanto.

Renato Corsetti
eksa prezidanto de UEA kaj amiko de Afriko

de Aimé-Patrick Manirakiza, **Burundo**

Prezidanto de la Nacia Asocio de Esperanto en Burundo (ANEB)



Karaj gastoj

Karaj esperantistoj de la tuta mondo,

Mi nomiĝas Manirakiza Aimé-Patrick, mi havas 32 jarojn. Mi havas universitatan diplomon pri komputiko. Mi esperantistiĝis en la jaro 2008. En 2011, mi trapasis sukcese meznivelan ekzamenon de ILEI/UEA kaj ricevis atestilon.

Mi estis elektita kiel prezidanto de la Nacia Asocio de Esperanto en Burundo (ANEB) la 26-an de marto 2018.

El la sukcesoj dum mia prezida mandato estas: la malfermo de la infanĝardeno nomata "La Espero" en Rumonge, la permesricevo de la burundaj instancoj por la organizo de la 7-a tutafrika kongreso en Burundo.

Nome de ĉiuj membroj de la Nacia Asocio de Esperanto en Burundo kaj en mia propra nomo, mi havas grandan ĝojon saluti kaj bonvenigi vin al la 7-a AKE, kiu komenciĝis la 21-an kaj finiĝos la 27-an de decembro 2019 en Bujumbura, la ĉefurbo de Burundo.

Burundo estas lando en Orient-Afriko, ĉirkaŭita de Ruando, Tanzanio kaj DR Kongo. Ĝi havas 12 milionojn da loĝantoj kun averaĝe mirinda vetero.

La partopreno en ĉi tiu Kongreso ebligas al vi malkovri la belecon de Burundo, aspektojn de ĝiaj kulturo, vidindaĵojn kaj kuirarton. Estas grava momento de plezuro kaj de kunestado. Dum tiu ĉi kongreso kuniĝas esperantistoj el 14 landoj!

Refoje mi varme bonvenigas vin ĉiujn kaj deziras bonan restadon en Burundo al vi. Dio benu vin!

Manirakiza Aimé-Patrick

Amariljo Karvaljo/ Bah'a do Garsas, **Brazilo**

Bedaŭrinde mia partopreno en via grava 7-a Afrika Kongreso de Esperanto fariĝis neebla. Mi devas tamen konfesi, ke mi revas partopreni en la 8-a AKE, en proksima estonteco.

Mianome, bonvolu saluti ĉiujn partoprenantojn en Bujumburo kaj specialan saluton al miaj karegaj nepoj el pluraj urboj de Afriko. Jesuo de Nazareto vin benu!

Dezirante plenan sukceson al via kongreso, feliĉan Kristnaskon kaj prosperan novjaron, elkore vin ĉiujn salutas via brazila avo.

Elisia Oliveira, **Brazilo**

Salutegon al vi ĉiuj el Brazilo!

Jen vi nun en la 7-a Afrika Kongreso de Esperanto! Mi deziregas fruktodonan eventon al ĉiuj kunhelpantoj kaj partoprenantoj en via kongreso.

Feliĉon al vi ĉiuj!

Libro de la 7-a AKE



de Jérémie Sabiyumva, **Burundo**
Ĉeforganizanto de la 7-a AKE



Karaj samideanoj,

Mi kun granda ĝojo salutas vin kaj bonvenigas vin en la 7-a AKE, kiu okazas en Burundo, Buĵumburo, de la 21-a ĝis la 27-a de decembro 2019. Mi ĝojas pro la fakto ke dum pluraj jaroj mi klopodis venigi tiun ĉi eventon en Burundo por doni okazon al multaj burundanoj kaj esperantistoj el la regiono partopreni ĝin, la solan grandan afrikan Esperantan eventon, sed neniam sukcesis.

Mi rolas dum pluraj jaroj en la urba, nacia, regiona kaj tutkontinenta movado, kunorganizis kaj okazigis plurajn eventojn sed neniam sukcesis kunorganizi ĝin en Burundo, malgraŭ niaj klopodoj.

En 2016, estis oportuno, sed pro la politika situacio ĉio ŝanĝiĝis lastmomente kaj la evento migris al Tanzanio, kie ĝi sukcese okazis.

Nun, ĝi okazas en Burundo, kaj mi ĝin kunorganizas havante alian kaskedon, kiu certe ne ŝanĝos mian organizsistemon, sed iel plifortigos ĝin kaj la rezulto estas certa. Mi estas estrarano de UEA kaj respondecas pri Afriko kaj Aktivula Maturigo. Mi pretendas ke mi konas Afrikon, sed mi ankaŭ povas diri ke mi havas sufiĉan konon de la afrika movado. Dum pasintaj jaroj, okazis divido inter afrikaj esperantistoj kaj tio malhelpis la disvolviĝon de la movado.

Diverseco inter ni estas granda riĉeco; male ne estu obstaklo, por malhelpi nin, esti en iu Esperanto-tendenco ne ŝanĝos kio ni estas, ni ĉiam memoru ke ni estas afrikanoj kaj ke la estonteco de la Esperanto-movado en Afriko dependas de ni ĉiuj. Ni kunlaboru en granda afrika harmonio, respektu unu la alian kaj evitu antaŭjuĝojn. Junuloj respektu maljunulojn kaj inverse.

Tiu ĉi kongreso venas en tre bona momento kiam en la estraro de Universala Esperanto-Asocio estas nova teamo kaj inter la teamanoj estas afrikano. Tio donas grandan avantaĝon, ĉar la estraranoj regule estas informataj de lokanoj pri kio okazas en Afriko kaj ankaŭ ricevas taŭgajn strategiojn por antaŭenpuŝi la movadon. Unu el la prioritatoj de la estraro estas plifortigi la movadon en Afriko kaj ĉesigi la dividojn. Ni ne ŝatas ke ĉiuj afrikanoj estu sub unu Esperanto-organizo, sed ni ŝatus ke ĉiuj afrikanoj sentu sin kiel amikoj, kunlaboru harmonie. Estas unua provo ke la kongreso okazas en tiu tre bela atmosfero, kun afrikaj esperantistoj el diversaj tendencoj. Bonvolu veni kiel afrikano, ne kiel iu kiu venas defendi intereson de iu organizo. La kongreso estas organizita sub la aŭspicio de UEA, kaj tio montras la emon, kiun UEA-estraranoj havas por Afriko. Ni profitu la pozitivan aspekton por plifortigi la movadon en niaj landoj.

Aliĝis ĉirkaŭ 200 personoj, sed ne ĉiuj kapablis ĉeesti nun, pro diversaj cirkonstancoj, sed tiuj, kiuj sukcesis veni, vere havos okazon ĝui, lerni kaj amuziĝi.

La AMO-programo, kiu komenciĝis antaŭ ses jaroj okazas ankaŭ dum la 7-a AKE. Tiu ĉi programo nun konas ŝanĝon, ĉar en la komitatkunsido okazinta en Lahtio, komitatoj rekomendis al la estraro plibonigi ĉi belegan programon, kiu celas plifortigi la kapablon de niaj aktivuloj. Pro tio, mi invitas niajn aktivulojn sufiĉe prepariĝi kaj profiti la programon, kiu estos gvidata de spertuloj el Afriko kaj Eŭropo.

Por fini, kiel ĉeforganizanto, mi garantias al vi ke la preparlaboroj iras glate, kaj forte esperas ke la kongresejo estas taŭga, la programoj estas bone elektitaj kaj certe respondas al viaj bezonoj, la ekskursejoj plaĉos al vi. En la organizteamo estas tre talentaj junuloj, kiuj senhezite moderne organizas la kongreson.

Vivu Esperanto! Dankon.

de Ans Bakker-ten Hagen, **Nederlando**



Estimataj ĉeestantoj, estimataj partoprenantoj en la 7-a Afrika Kongreso de Esperanto, karaj Esperantistoj,

Kun plezuro mi sendas al vi miajn salutojn okaze de tiu ĉi evento.

La organizantojn mi gratulas pro tio ke ili sukcesas prezenti al vi programon, kiu allogis vin.
Sendube ili laboris diligente por ke vi ĉiuj ĝuu la daŭron de la kongreso.

Ĉiu el vi, partoprenantoj, laboru ankaŭ diligente dum la 7-a AKE.
En la laborkunvenoj vi faru decidojn, kiuj antaŭenigas Esperanton en Afriko.
Vi certe lernas kiel organizi grupojn, kiel ligi la homojn al lokaj kaj landaj kluboj/Asocioj.
Se tion vi faras konstante, kun bona administrado, eblas fariĝi landa Asocio de UEA, Universala Esperanto-Asocio.
Vi estas tiuj kiuj scias kiom da plezuro al la vivo donas la Internacia Lingvo.
Pro kontaktoj kun Esperantistoj de aliaj lingvogrupoj, el aliaj kulturoj.

Vi scias kiom gravas regi la lingvon bone.

Tial mi tre aprezas la seminariojn en Afriko, kiujn organizas ILEI - la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj.
Ili kondukas al bona kono de la lingvo, poste eĉ al ekzamenoj por la kapablo instrui la lingvon. Por esti Esperanto-instruisto.

En pluraj Afrikaj landoj oni profitas la rezultojn de tiuj seminarioj.
En ĉiuj regionoj ekzistas diversaj kapablaj Esperanto-instruistoj.

Kelkaj personoj el vi lernis Esperanton de mia edzo, Hans Bakker.

Li, kun kelkaj Eŭropaj kaj Usonaj helpantoj, per paperaj lecionoj, senditaj en kovertoj kun poŝtmarkoj, instruis la Internacian Lingvon dum jardekoj, ekde la 80-aj jaroj, al multaj Afrikanoj.

Estas Esperantistoj el la tuta mondo kiuj ebligis tiun instruadon perkoresponde.

Ili donacis al la Afrika Fondaĵo de UEA por ke la lernantoj havu la eblon pagi siajn poŝtmarkojn.

Iam venos la tempo ke vi, loĝantoj en Afriko, finance subtenos agadon de UEA! Mi forte esperas pri tia plibonigo de ekonomiaj cirkonstancoj!

Dank' al instigo de Hans Bakker kaj dank' al la tiama laboro de sinjoro Koffi GBEGLO el Togolando ekestis la unua AKE. Mia edzo estus tre kontenta se li scius ke nun okazas la 7-a.

Tio estas unu el la fruktoj por kiuj li laboris dum preskaŭ la tuta vivo, subtenis agadon en Afriko per sia forto kaj per la financoj kiujn ni povis disponi por ke via kontinento fariĝu grava elemento en la tutmonda Esperanto-movado.
La laboro de ĉiuj nunaj aktivuloj estas gratulinda!

Ĝuu vi la kongreson.

Estu ĝi por vi ĉiuj fruktodona!

Ans Bakker-ten Hagen

Prof. d-ro SO Jinsu, **Koreio**



Belegan kongreson en purkolora kontinento

Unue, kiel unu el la partoprenintoj kaj prelegintoj dum la 6-a Afrika Kongreso de Esperanto en Bunda, Tanzanio, ĝuste antaŭ 3 jaroj, kaj vojaĝemulo kun belega memoro pri 8 afrikaj landoj en kiuj mi antaŭkongresis kaj postkongresis dum 25 tagoj, mi forte gratulas vin pro la 7-a Afrika Kongreso en Buĵumburo, Burundo.

Due, kiel prezidanto de la Korea Esperanto-Asocio kaj eksprezidanto de la Komisiono de UEA pri Azia-Oceania Esperanto-Movado (KAOEM), nuna estrarano de UEA pri Azio, Oceanio, Informado kaj Amikoj de Esperanto, mi salutas vin, kiuj venis el proksimaj kaj malproksimaj landoj kaj de foraj kontinentoj.

Por amikeco inter Afriko kaj Azio, 14 koreoj kaj 2 japanoj ĉeestis en via 6-a kongreso, kaj KAOEM invitis unu junulon el D. R. Kongo en aprilo de la kuranta jaro al la urbo Danang, Vjetnamio, kie okazis la 9-a Azia-Oceania Kongreso de Esperanto. La kontinentoj Afriko kaj Azio, Oceanio havas siajn specifajn kolorojn, buntajn kulturojn, belajn lingvojn kaj bonkorajn esperantistojn.

Ni azianoj ja volas sperti viajn kulturojn kaj fizike viziti la purkolorajn landojn de Afriko iam ajn. Esperantistoj en la mondo atendas la okazon de Universala Kongreso en via kontinento en baldaŭa tempo.

Mi aŭdas, ke la nombro de partoprenantoj en la 7-a Afrika Kongreso duobliĝis kompare kun tiu de la 6-a. Gratulon! Kun espero pri la prosperoj de la Afrika Kongreso kaj afrika E-movado, mi refoje salutas vin ĉiujn kiel azia amiko. Amahoro kaj Murakoze!

Prof. d-ro SO Jinsu
Prezidanto de KEA, Estrarano de UEA

Angel, Hispanujo

Nome de la Hispana E-Federacio kaj Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, mi kiel la vicprezidanto de la unua kaj prezidanto de la dua, salutas vin ĉiujn kaj deziras fruktodonan kaj sukcesan kongreson. Kun granda plezuro mi estus kun vi, ĉar mi havas multajn amikojn en via kontinento, inter ili mi devas mencii mian gravan amikon, John Emmanuel Magesa de Tanzanio, prezidanton de Muleba Esperanto-Klubo, Amany Byamungu kaj Alphonse Waseka de DR Kongo, la tre konatan de vi ĉiuj Jérémie Sabiyumva, estraron de UEA, kiu multe laboris por aranĝi la kongreson kaj daŭre laboras por ke ĉio okazu laŭplane kaj la internacia lingvo brilos intense kaj lumigos novajn homojn. Ĉiuj vi estas bonkoraj homoj kaj bonaj esperantistoj kiuj estas en mia koro. Afriko estas la estonteco de Esperanto. Mi amas Afrikon.

Jean Codjo, Kanado



Karaj gekongresanoj,

Kiel afrikano kaj mondcivitano, mi ĉefe deziras sukceson al la organizantoj de tiu ĉi grava afrika evento, dum kiu multaj afrikanoj renkontiĝas por elpensi efikan strategion kun la intenco plifortigi la movadon. Espereble, dum la venontaj tagoj, vi kaptos la okazon por semi pliajn grajnoj de amikeco, ne nur inter vi, sed ankaŭ kun la E-komunumo tutmonde.

Jean Codjo, eks-kunordiganto de la Afrika Komisiono de UEA

de la urboestro de Buĵumburo, **Burundo**

Ekscelenco S-ro la ministro por la kulturo,
 Estimata s-ro la reprezentanto de la oficejo de Unesko en Burundo,
 Estimata s-ro Maia Jr. Fernando, vicprezidanto de la Universala Esperanto-Asocio,
 Estimata s-ro Mireille Grosjean, prezidanto de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj
 Estimata s-ro Koufionou Koffitché, estrarano de la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
 Estimataj gesinjoroj de la Afrika Komisiono de UEA,
 Estimata s-ro Aime-Patrick MANIRAKAZI, prezidanto de la Asocio Nacia de Esperanto en Burundo,

Honoraj gastoj
 Karaj gekongresanoj,

Mi ŝatus bonvenigi vin al nia urbo Buĵumburo.

Estas honoro por Burundo kaj la urbo Buĵumburo gastigi vian 7-an Afrikan Kongreson de Esperanto, okazanta en la lernejo SOS Nyakabiga de la 21-a ĝis la 27-a decembro 2019.

Afriko distingiĝas per granda kultura riĉeco kaj diversaj lingvoj. Ĉi tio estas pozitiva punkto, sed ankaŭ estas fonto de malfacilaĵoj el la komunika aspekto. Tial ni rigardas kun intereso la disvolviĝon de la internacia lingvo Esperanto kiel neŭtrala lingvo, kiu devas faciligi komunikadon inter homoj, sendepende de iliaj originoj, religioj kaj etnoj ktp.

Mi estas agrable tre impresita de ĉi tiu inaŭgura ceremonio kaj de la etoso, kiu regas inter vi danke al ĉi tiu lingvo, kiu estas Esperanto. Kiel lingvo por paco kaj frateco, ĝi devas daŭrigi sian progreson por doni altvalorajn servojn al la tuta homaro.

Mi esperas, ke via kongreso portos al vi novajn informojn, interŝanĝojn de ideoj, agrablajn momentojn, gustumojn de burunda kuirarto kaj ke la tuta mondo atentus, pere de vi, ĝenerale al Afriko kaj precipe al Burundo. Baldaŭ ni oficiale efektigos la solenan malfermon de la 7-a Afrika Kongreso de Esperanto kaj antaŭĝojos, ke la Universala Esperanto-Asocio honorigos nin per okazigo en pli proksima estonteco de la unua Universala Kongreso de Esperanto sur la afrika kontinento en Burundo.

Per tiuj esperplenaj vortoj, mi deziras al vi ĉiuj bonan restadon en Burundo, aparte en ĝia bela ĉefurbo Buĵumburo, kaj mi oficiale deklaras malfermita la 7-an Afrikan Kongreson de Esperanto.

Vivu la amikeco inter popoloj!
 Vivu la paco en la mondo!
 Vivu la internacia lingvo Esperanto!
 Vivu Burundo!

Mi dankas vin.

Humphrey Tonkin, **Usono**



Karaj kongresanoj!

Mi ĝojas havi okazon saluti vin, okaze de la 7-a Afrika Kongreso de Esperanto, kiu okazos en Bujumbura post kelkaj tagoj. En lastaj jaroj, la Internacia Lingvo Esperanto travivas kreskon de interesiĝo inter afrikanoj, parte pro tio, ke afrikanoj serĉas kontaktojn en aliaj partoj de la mondo kaj Esperanto bone funkcias por tiu celo, sed parte pro tio, ke afrikanoj estas aparte sentemaj pri lingvaj diferencoj kaj pri la malfacilaĵoj, kiuj povas ekesti kiam oni favoras unu lokan lingvon pli ol alian, aŭ kiam mankas komuna lingvo por solvi lokajn problemojn. Esperanto, kiel neŭtrala lingvo, povas superponti lokajn diferencojn, konservi lokajn kulturojn, kaj samtempe malfermi novajn horizontojn sciencajn, kulturajn kaj politikajn. Ĝi ebligas al vi levi viajn voĉojn je tutmonda skalo.

En la jaro 2020, Unuiĝintaj Nacioj festos 75 jarojn de sia ekzisto. En tiu jaro, ĝi malfermos tutmondan konversacion pri la estonteco de UN kaj de internacia kunlaboro. Mi esperas, ke vi utiligos tiun okazon por partopreni la debaton – ankaŭ pere de Esperanto. Mi invitas vin ĉiujn kontakti nin tiucele.

Humphrey Tonkin

Reprezentanto de Universala Esperanto-Asocio ĉe Unuiĝintaj Nacioj Novjorko.

Jasuo Hori, **Japanio**

Mi deziras sukcesegon al la 7-a Afrika Kongreso de Esperanto (AKE).

Mi unu fojon vizitis afrikan landon, nome Beninon. Mi multe deziras mian denovan viziton al afrikaj landoj. Afriko estas tre malproksima de Japanio, sed ni estas amikoj dank' al Esperanto





Bert Ŝuman, **Francio**

La franca Esperanto-kastelo Greziljono amike salutas la kongreson kaj deziras sukcesplenan kongreson.

Ĝuste unu tagon post via kongreso komenciĝos jarfina Esperanto-renkonto en Greziljono. En ĝi, itala esperantisto prelegos pri la lingvo svahila, Tanzanio kaj Zanzibaro.

Masako Tahira, **Japanio**

Mi neniam forgesis la ĝojon ĉeesti en la 6-a Afrika Kongreso de Esperanto kune kun mia edzo Minoru, solaj el Japanio, en Tanzanio 2016.

Dank' al Esperanto ni povis vojaĝi tiom malproksimen kaj amikiĝi kun afrikaj esperantistoj.

Mi tre esperas, ke baldaŭ okazos UK en Afriko.

Grandan sukceson al la 7-a Afrika Kongreso de Esperanto en Bujumburo!



de Stefan MacGill, **Nov-Zelando**



Karaj kongresanoj,

Mi bondeziras al la 7-a Afrika Kongreso de Esperanto de UEA kaj gratulas al la Afrika Komisiono pro la preparlaboroj. Mi memoras la 6-an AKE en Bunda, Tanzanio, kun granda ĝojo – temis pri mirinda sperto, kaj tio vere donis al mi enigardon de la afrika movado.

Mi bondeziras al la 61-a AMO-seminario, espereble ĝi faros konkretajn rekomendojn, ankaŭ ke vi revizitu la rekomendojn de la 29-a AMO en Bunda, Tanzanio.

Ni atendas raportojn pri la kongreso kaj la AMO-seminario, por ke la tuta modo konu viajn laborojn kaj atingojn.

Mi salutas vin el Nov-Zelando, kie en januaro okazos la 62-a AMO-seminario.

Kore,

Stefan MacGill

Eksa vicprezidanto de UEA.

Johan Derks, **Serbujo**

Mi sendas al vi sincerajn salutojn kaj deziras al vi gajan kaj efikan laboron dum la 7-a Afrika kongreso de Esperanto.

Johan Derks, eks-prezidanto de "Esperanto en Evoluo"



D-ro Manfred Westermayer, **Germanio**

Jen nia saluto al la 7-a Afrika Kongreso de Esperanto en Buĵumburo, Burundo, de la 21-a ĝis la 27-a de decembro 2019. Vi eble scias, ke Baden-Virtemberga Esperanto Ligo (BAVELO) kunlaboras kun ANEB, kaj aparte kun la E-Centro de Rumonge.

Dank' al la partnereco inter Burundo kaj la germana lando Baden-Württemberg ni povas subteni niajn burundajn geamikojn por pli bone evoluigi la centron kaj interesigi ĝin al la gejunuloj.

Nova projekto celas la bonan nutradon de la infanoj de la infanĝardeno "Ecole Maternelle Espero" - ĝi uzas parton de la centro dum 5 tagoj semajne; kaj ni planas ekologian kultivadon sub la arboj.

Mi tre dankas pro via invito al mi partopreni la 7-an AKE, kiun vi prezentis al mi dum la Universala Kongreso de Esperanto en Lahti, sed mi sentas min tro aĝa kaj timema pro mia sano :(

Do, nome de BAVELO mi bondeziras al ĉiuj partoprenantoj de la 7-a AKE gajan kunvenon kaj sukcesplenajn diskutojn pri la evoluo de Esperanto en la grandega kontinento Afriko.

D-ro Manfred Westermayer

Respondeculo de BAVELO pri la kunlaboro kun Burundo

Libro de la 7-a AKE

de Probal Dasgupta, **Barato**



Karaj kongresanoj partoprenantaj en la 7-a Afrika Kongreso de Esperanto

Mi kun granda ĝojo salutas vin kaj deziras al via kongreso grandan sukceson. La progreso de Esperanto en Afriko estas progreso en la komunikaj agordoj inter afrikanoj kaj alikontinentanoj. Tiuj agordoj estas tre grava loko kiun ni ĉiuj -- en la tuta esperantista komunumaro -- devas aparte atenti. Estas ĝenerale konate ke Afriko estas la kontinento plej severe suferinta ĉiaspecan ekspluatadon kaj diskriminacion. Renversi tiun negativan dinamikon inter Afriko kaj la cetera mondo estas grava parto de la laboro fari el la homaj socioj "unu grandan rondon familian". Ĉi-rilate oni ofte mencias la kulpon de la eŭropaj gvidantoj de tiu ekspluata kaj diskriminacia dinamiko. Sendube la historiistoj devas okupiĝi pri tiuj eventoj. Sed la nuntempa homaro devas sin demandi kiuj do laboru por malvenenigi la rilaton inter afrikanoj kaj ĉiuj aliaj. Mi, kiel baratano, ne povas ignori la hororan fakton ke la afrikaj studentoj en barataj universitatoj ofte, en la universitatoj kaj en siaj loĝkvartaloj en niaj urboj, alfrontas severan rasismon. La blankuloj en okcidentaj socioj almenaŭ lernis la memkritikon kaj multon faras por kontraŭbatali la rasisman viruson. En Barato, la sento ke ni (baratanoj) mem estas eksviktimoj de la okcidenta rasismo kaj devas nun kontraŭbatali ĝin ofte kaŝas de nia konscio la fakton ke en nia konduto vidalvide al aliaj popoloj multaj baratanoj manifestas propran rasismon kaj diskriminacias kontraŭ alisocioj. Tial eĉ la plej kleraj baratanoj, bedaŭrinde, malofte publike kritikas la konduton de multaj baratanoj al aliuloj. Tiu problemo apenaŭ ricevas prioritatan atenton en niaj amaskomunikiloj. Esperanto estas interalie forumo en kiu ni povas reliefigi la diskriminacion kaj la universalan batalon kontraŭ tiu patologio en la interhomaj rilatoj. Tial vi trovos ke la esperantistoj en Barato (kiel en ĉiuj aliaj socioj) estas konsciaj pri la ekzisto de diskriminacia konduto en nia socio kaj batalas kontraŭ ĝi. Ekzemple la Bengaluraj Esperanto-Renkontiĝoj, la BEROj, gvidataj de Giridhar Rao ofte bonvenigis afrikajn gastojn. Tiu miela guto evidente ne povas tujtuje venki oceanon da horore malbona konduto; tamen, en Esperantujo ni lernas aspiri, kaj tiu nia aspiremo estas kontaĝa kaj influas la publikon iom post iom al la forigo de la diskriminaciaj tendencoj.

Evidente mi devus pardonpeti pro la longeco de mia saluto. Sed mi volas pli serioze peti la pardonon de afrikanoj pro la konduto de multaj miaj samlandanoj -- en Barato kaj eĉ en Afriko -- kiuj malbone rilatis al afrikanoj en la pasinteco kaj daŭre kondutas tiel eĉ nuntempe. Iom post iom ni ŝanĝiĝos en ĉiuj niaj socioj. Kaj Esperanto donas al ni la kapablon avangardi sur tiu batalfronto.

Mi havas por vi trian pardonpeton. Mi bedaŭrinde ne estas sufiĉe teknike lerta por tion ĉi buŝe diri, sonregistri komuniqueble, kaj transsendi al viaj aparatoj por ke ne necesu ke iu alia laŭtleĝu miajn vortojn. Espereble neniuj alia salutmesaĝo enhavas tri pardonpetojn! Sukceson al via kongreso, kaj malabundu necesoj pardonpeti inter vi kiuj kongresas kune!

Amike

Probal Dasgupta

Kongresaj aktivaĵoj

Ŝanĝoj povas okazi.

Ĉiuj programeroj okazos en la kongresa hejmo SOS Nyakabiga

Tempo	Programero	Respondeculo(j)
Sabaton, la 21-an de decembro 2019		
Ekde 13:00	- Akcepto de la kongresanoj ĉe la lernejo SOS Nyakabiga - Loĝigo de kongresanoj - Pluricevo de la kotizo pagota de gekongresanoj surloke - Registriado de kongresanoj kaj disdono de kongresaj dokumentoj (sako, libro, nomŝildo) al ili	Hasano
16:00 – 17:00	Radioelsendo pri Esperanto	Aimé-Patrick
18:00 – 19:30	Vespermanĝo	Twalibu
20:30 – 21:30	Interkona vespero: ludoj, kantoj, dancoj, deklamo de poemoj	Miora, Jérémie, Léopold
Dimanĉon, la 22-an de decembro 2019		
07:30 – 08:30	Matenmanĝo	Twalibu, Patrick
09:00 – 09:30	Malfermo de la 61-a AMO-seminario	Jérémie
09:30 – 10:00	Konflikto solvado	Duncan
10:00 – 10:50	UEA kaj TEJO (kaj la nova kotizsistemo)	Mireille
11:00 – 12:00	Eksteraj rilatoj – prelego pri miaj spertoj	Mireille G.
12:30 – 13:50	Tagmanĝo	Twalibu, Patrick
